



Aŭgusto - Decembro - 2006

Domoto

INTERNACIA

**Invito al la Mondo de Miroku
Rakontoj el la Spirita Mondo**

**Bonajn modelojn de
l' Ĉielula Regno**

**Kolekto da paroloj
pri dikredo**

Eliza Palmes

Diaj Revelacioj **03**

Revelações Divinas **03**

Dua Datreveno de Oomoto Internacia **04**

Segundo aniversário da Oomoto Internacional **05**

Invito al la Mondo de Miroku **06, 08**

Convite ao Mundo de Miroku **07, 09**

La Rakontoj el la Spirita Mondo **10**

Os Contos do Mundo Espiritual **11**

Bonajn modelojn de l' Ĉielula Regno **12, 13**

La 41a Brazila Kongreso de Esperanto **14**

O 41° Congresso Brasileiro de Esperanto **15**

Kolekto da paroloj pri dikredo **16**

Coleção de escritos sobre a crença em Deus **17**

A.O.I. kaj la tutmondiĝo **18**

A A.O.I. e a globalização **19**

Statuto de La Asocio Amikaro de Oomoto Internacia **20**

Estatuto da Associação dos Amigos da Oomoto Internacia **21**

Agado de Oomoto Internacia **22, 23**

Oomoto

SHIN - QI 14 Conj.5 Casa 23 Lago
Norte Brasília-DF - Cep: 71.530.050

Editoro / Editor:

MAEDA Shigeki

Respondeca ĵurnalisto / Jornalista responsável:

Emerson Werneck - 6254/MG

Redaktoro en Esperanto / Redator em Esperanto:

MAEDA Shigeki

Redaktoro en la portugala / Redator em português:

Emerson Werneck

Tradukistoj / Tradutores:

Francisco Mattos de Oliveira, Ana Rosario Koide Kamey,
Mário Fonseca

Paĝaranĝo / Diagramação:

Agentejo Midiax (Agência Midiax)

Kovrilo / Capa:

Elza Palmoj (Elza Pereira Ramos)

Malantaŭa kovrilo / Contra capa:

Sakuro Konohana en la Sankta Tereno de Oomoto,
Kameoka

Eldono / Tiragem:

1000

Diaj Revelacioj

Novjaron(lunan) en la 25-a jaro de Mejji (1892)

6. Sciu ke la vortoj de Dio realiĝos kun nenia eraro, sen eĉ harlarĝo da diferenco. Se ne, Dio ne ekzistas en ĉi tiu mondo.

7. Ĉiuj religioj estis antaŭkurantoj kaj kiel la lasta, Mi, Dio Uŝitora, aperis por plenumi la malkonstruon kaj rekonstruon de la mondo.

8. Ĉiuj Diaj senditoj scias ke okazos la malkonstruo kaj rekonstruo de la mondo, sed ili ne scias, kiel tio plenumiĝos. Mi sciigis al ili preskaŭ ĉion, tamen ili ankoraŭ ne komprenas la plej esencan punkton.

9. Mi estas Dio, por kiu ekzistas nenio nekonata en la tuta mondo. Kiam vi fariĝis malgaja, vizitu Oomoton en Ajabe kaj aŭskultu Dian instruon. Mi favoros vin per Diforto travidi ĉion en la mondo per nur unu rigardo.

Revelações Divinas

Primeiro dia (lunar) do ano 25 da Era Meiji (1892)

6. Sabei que as palavras de Deus se cumprirão sem nenhuma falha, sem a diferença de nem um fio de cabelo sequer. Do contrário, não existe Deus neste mundo.

7. Todas as religiões foram precursoras, e, como o último, eis que Eu, o Deus Ushitora, surgi para cumprir a destruição e reconstrução do mundo.

8. Todos os mensageiros de Deus sabem que ocorrerão a destruição e reconstrução do mundo, mas não sabem como isso se realizará. A eles Eu informei quase tudo; eles, porém, ainda não entendem o ponto essencial.

9. Eu sou Deus, para quem nada existe de desconhecido no mundo inteiro. Caindo em tristeza, visitai a Oomoto em Ayabe e ouvi o ensinamento de Deus. Eu favorecer-vos-ei com o Poder Divino de enxergar através de todas as coisas do mundo, num só relance.

Dua Datreveno de Oomoto Internacia

MAEDA Shigeki

Retrorigardante pasintajn du jarojn

En la decembro de ĉi tiu jaro (2006) Oomoto Internacia akceptos sian duan datrevenon. Fakte, antaŭ du jaroj, kun granda emocio ni celebris la inaŭguron de la nova internacia organizo de Oomoto en Braziljo. Por la inaŭgura festo, multe dankinde, bonvolis partopreni la Kvina Spirita Gvidantino de Oomoto, Majstrino DEGUĈI Kurenai, kaj aliaj cent oomotanoj el Japanio. La kortuŝaj belaj scenoj en la inaŭguro eĉ nun klare reviviĝas en mia cerbo.

Nu, verdire, ĉe la komenco mi sentis grandan maltrankvilecon, veninte sola al la plej malproksima lando disde Japanio, mia patrio. Mi estis embarasita eĉ ĉe ĉiu paŝo pro la granda diferenco de kutimo kaj kulturo inter ambaŭ landoj, sed dank' al la esperantistoj, kiuj varmkore simpatie helpis kaj subtenis min, mi povis atingi la nunan situacion. Se mi ne povis paroli Esperanton, povis esti ke al Oomoto Internacia ne prosperis la nuna agadstato.

En la daŭro de ĉi tiuj du jaroj, ni povis viziti entute 41 spiritualismajn organizojn, de ili administratajn lernejojn, orfejojn kaj kadukulejojn. Kaj kun ili ni amikiĝis kaj promesis kunlabori por la estonta ideala mondo.

Paralele kun tiu agado, ni komencis antaŭenpuŝi du gravajn projektojn: unu estas fondi la novan organizon AOI (Amikaro de Oomoto internacia) kaj alia estas formi la karavanon por la partopreno en la venontjara UK en Jokohamo kaj por la vizito en Oomoto.

Koncerne la novan organizon AOI, ĝia statuto estas jam kompletigita (en ĉi tiu gazeto ĝian parton ni publikigas) kaj la estraroj estos deciditaj ĝis ĝia fondokunveno, kiu eventuale okazos en la decembro de ĉi tiu jaro kune kun la festo de la dua datreveno de Oomoto Internacia. La celo de AOI estas: 1-e, por fari pli forta la movadojn de Esperanto kaj Oomoto Internacia; 2-e, por fari pli koneksa la kunlaboron inter Oomoto Internacia kaj aliaj spiritualismaj organizoj; 3-e, por fari pli vigla la kulturalan agadon (inkluzive de organika



La preĝejo Ĉoosejden en la Sankta Tereno de Oomoto, Ajabe, Kioto

agrikulturo kaj japanaj artoj). Laŭ mi, ĉi tiuj ĉiuj finfine kontribuos por la realiĝo de la ideala mondo de Dio, la mondo de Miroku.

Koncerne la karavanon por la vojaĝo en Japanio, post la partopreno en la 92-a Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo, la karavano vizitos la sanktajn terenojn de Oomoto, Kameoka kaj Ajabe. Ĉi tiun viziton faros ne nur Brazilaj esperantistoj, sed faros ankaŭ aliaj esperantistoj, kaj tamen, precipe por Brazilanoj la vizito havos apartan signifon: Oomoto invitas la karavanon unue por esprimi dankemon al Brazilaj esperantistoj kiuj multe subtenas kaj helpas la agadon de Oomoto Internacia, kaj due prezenti al vizitantoj Utafeston, la pacan eventon, tradicie japanan. Ĉi-lastan Oomoto planas organizi ankaŭ en Braziljo kelkajn jarojn poste: el Braziljo, la nova sankta tereno de la mondo, la paca preĝo de utaoj, versitaj de Brazilanoj, trauros tra la mondo laŭ la antikva bela melodio kun akompano de la plej malnovaj instrumentoj de Japanio. Se realiĝos ĉi tiu paca festo en Braziljo, tio fariĝos evento, ne nur historie valora, sed ankaŭ preĝo, terglobuska efika, mi kredas.

Do, fine, mi sincere kaj elkore deziras, ke ĉiuj legantoj akceptu feliĉan jaron 2007. Korajn Dankojn!

Segundo aniversário da Oomoto Internacional

MAEDA Shigeki

Retrospectiva dos dois últimos anos

Em dezembro desse ano de 2006, a Oomoto Internacional celebrará o seu segundo aniversário. Em verdade, há dois anos, celebramos, com grande emoção, a inauguração da nova organização internacional da Oomoto, em Brasília. Na festa de inauguração, ficamos muito gratos com a bem-vinda participação da Quinta Líder Espiritual da Oomoto, a Mestra Kurenai DEGUCHI e outros cem oomotanos oriundos do Japão. As belas e emocionantes cenas da inauguração, até hoje permanecem claras em minha memória.

Pois bem! Em verdade, no início senti grande preocupação, já que tinha vindo só, até o país mais distante do Japão, minha pátria. Ficava sem jeito, embaraçado, até mesmo para dar cada passo seguinte, em razão da grande diferença de costumes e de cultura entre os dois países, mas graças aos esperantistas, que simpática e amorosamente me ajudaram e me apoiaram, pude chegar à situação atual. Se não soubesse falar Esperanto, provável é que a Oomoto Internacional não tivesse evoluído até a situação presente, quanto às suas atividades.

No curso desses dois anos, tivemos a oportunidade de visitar um total de 41 instituições espiritualistas, dentre elas escolas, orfanatos e asilos para idosos. E com elas fizemos amizade e prometemos colaborar por um mundo ideal, no futuro.

Paralelamente a essas atividades, começamos a trabalhar em prol de dois projetos importantes: um é a fundação da nova organização AOI (Amigos da Oomoto Internacional) e o outro é a formação de uma caravana dos futuros participantes do Congresso Mundial de Esperanto de Yokohama, no ano vindouro, e a visita à sede da Oomoto no Japão.

Com relação à nova organização AOI, o seu estatuto já está pronto (esse texto nós publicamos parcialmente nesta edição da revista) e os seus dirigentes foram escolhidos durante a

assembléia de sua fundação, que ocorreu em dezembro desse ano, simultaneamente à festa do segundo aniversário da Oomoto Internacional. Os objetivos da AOI são: 1º) Fortalecer os movimentos do Esperanto e da Oomoto Internacional; 2º) Melhor coordenar a colaboração entre a Oomoto Internacional e outras organizações espiritualistas; 3º) Fortalecer as atividades culturais (inclusive aquelas relacionadas à agricultura orgânica e às artes japonesas). Penso que todas essas atividades, ao final, contribuirão para a construção do mundo ideal de Deus.

Com relação à caravana de viagem ao Japão, após a participação no 92º Congresso Mundial de Esperanto em Yokohama, a caravana visitará os lugares sagrados da Oomoto, Kameoka e Ajabe. Essa visita será feita não apenas por esperantistas brasileiros, mas também por esperantistas de outros países e, no entanto, tal visita revestir-se-á, principalmente para os brasileiros, de significado especial: a Oomoto convida a caravana, primeiramente para expressar gratidão aos esperantistas brasileiros que fortemente apóiam e ajudam as atividades da Oomoto Internacional e, em segundo lugar, apresentar aos visitantes a Festa Uta, o evento de paz, tradicionalmente japonês. Essa última (a Festa Uta), a Oomoto planeja organizar também em Brasília, alguns anos depois; de Brasília, o novo terreno sagrado do mundo, a oração pacífica dos autores de uta, expressa pela voz e sentimentos de brasileiros, percorrerá o mundo segundo a bela e antiga melodia e acompanhamento dos mais antigos instrumentos do Japão. Creio que se conseguirmos realizar essa festa de paz em Brasília, será esse um evento não apenas de valor histórico, mas também constituirá uma oração de eficácia mundial.

Por fim, sinceramente e do fundo do meu coração, desejo que todos os leitores aceitem os meus votos de um Feliz 2007. Muito agradecido.

Invito al la Mondo de Miroku

La mondo de la Rakontoj el la Spirita Mondo

verkita de DEGUĈI Onisaburo

Esperantigo: MAEDA Shigeki

Oomoto havas du doktrin-fondintojn, nome, la Fondintino DEGUĈI Nao (1837-1918) kaj Majstro DEGUĈI Onisaburo (1871-1948).

La Fondintino klarigis la varp-funkcian parton de la doktrino (Dia plano por estonteco) kaj la Majstro la veft-funkcian parton de la doktrino (la surtera savo).

Majstro DEGUĈI Onisaburo naskiĝis en Kameoka de Kioto, Japanio, kaj lia infana nomo estis UEDA Kisaburo. Oni lin rigardis kiel mirinfanon; 26-jara, li plenumis unu-semajnan spiritan kaj korpan asketismon en la sankta monto Takakuma apud lia naskiĝloko. Tie li ricevis diversajn Diinstruojn kaj spiritkapablojn kaj ekkonsciis sian mondsavan mision.

En 1899, laŭ la konduko de Dio, la Majstro vizitis Fondintinon DEGUĈI Nao en Ajabe; li oomotaniĝis kaj klopodis por antaŭenpuŝi Dian aferon, ŝin helpante. Poste li edziĝis al Sumiko (la Dua Gvidantino de Oomoto), la plej juna filino de Nao, kaj ŝanĝis sian nomon al DEGUĈI Onisaburo.

La Majstro ĝuis bonan reputacion en kaj ekster la lando kiel granda spirit-kapablulo kaj profeto; dume li verkis grandegan kvanton da doktrinaj kaj instruaj libroj inkluzive la libron "Rakontoj el la Spirita Mondo", kaj konstruis la bazon por savi la modon, ordigante la doktrinon kaj organizon de Oomoto. Tiuj instruoj havas la eblon alporti grandan reformon al ekzistantaj religioj t.e. al iliaj dikonceptoj kaj doktrinaj sistemoj; kaj fakte ĝi donis fortan impulson kaj influon al la mondo.

Pro tia doktrino pri Dio, klarigita de Oomoto, aŭ pro la paŝoj por paciismo, internaciismo kaj la ŝanĝo de aktuala stato, la tiama registaro, iranta sur la vojo de fanatikaj naciismo kaj militismo, donis al Oomoto grandan subpremon, senprecedencan en la historio de la moderna epoko en Japanio, dufoje: en 1921 kaj 1935. Interalie, ĉe la Dua Oomoto-Afero en 1935 (-1945) la registaro ne nur konfiskis la sanktajn terenojn de la organizo, sed ankaŭ detruis ĉiujn ĝiajn instalaĵojn, arestis pli ol 3000 kredantojn kaj el tiuj mortis dek ses personoj pro severa torturo.



La gesinjoroj DEGUĈI Onisaburo kaj Sumiko estis enkarcerigitaj dem ses jaroj kaj ok monatoj kiel juĝotoj, sed la afero solviĝis kun la finiĝo de la Dua Mondmilito.

Majstro DEGUĈI Onisaburo estas bone konata kiel artisto, kiu ellaboris elstarajn verkojn, inter kiuj plej famas Jooŭan (bril-bovlo). Dume, tra sia tuta vivo, li revelaciis la doktrinon por savi homaron super raso, religioj kaj landlimoj, bazitan sur la ideo "samdeveneco de la religioj", kaj por la konstruo de la spirite-religie unuecigita mondo laŭ la ideo "ĉiuj homoj estas gefratoj", li ja konstruis firman fundamenton por alporti Dian mondon (la ĉielulan regnon), plenan je humaneco, sur la tero. (el "Por legantoj", internacia eldono de Diaj Vojsignoj)

Convite ao Mundo de Miroku

O mundo dos “Contos do Mundo Espiritual,
de Onisaburo DEGUCHI

Traduzido ao esperanto por: Shigeki MAEDA

Traduzido ao português por: Benedicto Silva



A Oomoto tem dois fundadores doutrinários, isto é, a Fundadora Nao DEGUCHI (1837-1918) e o Mestre Onisaburo DEGUCHI (1871-1948).

A Fundadora explicou o plano de Deus para o futuro e a salvação terrena, comparando-os, respectivamente, à função da urdidura e da trama, na tecelagem.

O Mestre Onisaburo DEGUCHI nasceu em Kameoka, Quioto, no Japão, e seu nome na infância era Kisaburo UEDA. Era considerado uma criança prodígio. Aos 26 anos de idade praticou, durante uma semana, ascese espiritual e corpórea no monte sagrado Takakuma, próximo à sua terra natal. Recebeu ali diversos ensinamentos divinos, faculdades espirituais, e ainda tomou conhecimento de sua missão de salvador do mundo.

Em 1899, guiado por Deus, o Mestre visitou a Fundadora Nao DEGUCHI em Ayabe. Tornou-se oomotano, empenhando-se a ajudá-la a impulsionar a causa divina. Mais tarde casou-se com Sumiko (a Segunda Guia Espiritual da Oomoto), filha caçula de Nao, passando a chamar-se Onisaburo DEGUCHI.

O Mestre gozou de boa reputação, dentro e fora do país, pela sua grande faculdade espiritual e como profeta. Nesse ínterim, escreveu enorme quantidade de livros doutrinários e instrutivos, inclusive os “Contos do Mundo Espiritual”, construindo o alicerce da salvação do mundo, ordenando a doutrina e a organização da Oomoto. Esses ensinamentos têm a possibilidade de trazer grande reforma às religiões existentes, isto é, a seus conceitos sobre Deus e sistemas doutrinários. Realmente tudo isso exerceu grande influência no mundo, ocasionando

forte progresso.

Em razão da doutrina acerca de Deus, explicada pela Oomoto, ou em virtude de seus passos em direção ao pacifismo, ao internacionalismo e à mudança da situação então vigente, o governo de então, que trilhava o caminho do fanatismo nacionalista e militar, esmagou a Oomoto com um grande golpe sem precedentes na história dos tempos modernos do Japão, e isso por duas vezes: em 1921 e 1935. Entre outras coisas, no Segundo Caso-Oomoto, em 1935 (-1945), o governo não só confiscou os terrenos sagrados da organização, mas também destruiu todas as suas instalações, prendeu mais de 3.000 fiéis, dos quais dezesseis morreram em decorrência de cruel tortura. O casal Onisaburo e Sumiko DEGUCHI ficou preso durante 6 anos e 8 meses, como réus, mas o caso só foi solucionado com o término da Segunda Guerra Mundial.

O Mestre Onisaburo DEGUCHI é amplamente conhecido como artista, criador de proeminentes obras, entre as quais têm grande celebridade suas Yoowan (tigelas brilhantes). Entrementes, através de toda a sua vida ele revelou a doutrina destinada à salvação da humanidade que paira acima das raças, religiões e fronteiras nacionais, doutrina que tem por base a idéia de “uma única origem das religiões”, e para a construção do mundo unificado espiritual e religiosamente segundo a idéia de que “todos os homens são irmãos”, ele construiu, com efeito, um fundamento firme para trazer um mundo divino (o reino celeste), cheio de humanitarismo, à Terra. (de “Aos leitores”, na edição internacional de “Rumos Divinos”)

Pri DEGUĈI Onisaburo la verkinto

DEGUĈI Onisaburo (1871~1948) nasikiĝis en Kameoka, gubernio Kioto. En 1898, ĉe la asketismo sur la monto Takakuma, elstaranta apud lia nakiĝloko, li ekkonciis sian mision kiel religiulo. En la sekva jaro li apartenis al la tendaro de Oomoto (fondita en 1892) en Ajabe. En 1925 li fondis la Universalan Homaman Asocion kaj lanĉis la proponon pri la universala homamo kaj la samorigineco de ĉiuj religioj. En 1934 li inaŭguris la organizon “Ŝoŭa-Ŝinseikaj” kaj komencis la nacian spiritan (moralan) movadon sub la aprobo de 10 milionoj da homoj. En 1935 okazis la Dua Oomoto-Afero (subpremo fare de la registaro) kaj li pasigis 6 jarojn kaj 8 monatojn en malliberejo pro la suspekto pri la rompo de “Leĝo por Publika Ordo” kaj pri la krimo “Malrespekto kontraŭ Tenno”. Kvankam Oomoto ricevis detruan baton, en 1945 decidiĝis la senkulpeco de Oomoto. Sed, Onisaburo neniom postulis al la ŝtato la kompensan monon. Li ĝuis altajn taksojn en la kampo de artoj, nome, kaligrafio, ceramika arto, utao (tankao) k.a. kaj la artaĵoj estis ekspoziciataj en Eŭropo kaj Usono. Multaj verkoj: “la Rakontoj el la Spirita Mondo (81 volumoj)” k.a.

Pri “Rakontoj el la Spirita Mondo”

En oktobro 1921, 23 jarojn post la asketado en la monto Takakuma, Majstro DEGUĈI Onisaburo ricevis de Dio ordonon: “Klare montru la aferojn, kiujn vi vidis kaj aŭdis en la asketado sur la monto Takakuma”; do li unuafoje publikigis la enhavon, ĝis tiam gardatan en la korprofundo, kiel “Rakontoj el la Spirita Mondo”.

“Jen ĉi tiu estas rakonto, kia konsistas el la de mi efektive viditaj diversaj cirkonstancoj en la mondoj obskura (sfero, inkluzivanta la regnojn Internan kaj inferan) kaj Dia, kiam mia animo vojaĝis en la spirita mondo. En la spirita mondo ĉio transcendas tempon kaj spacon, kaj la antikvaj kaj nuntempaj aferoj en la spirita mondo ĉiuj ebene speguliĝas en la okuloj, sendistinge pri tio, ĉu ili estas malproksimaj aŭ proksimaj, grandaj aŭ malgrandaj, lumaj aŭ mallumaj. Sekve, por ke legantoj laŭeble facile komprenu, mi diktis, serĉante la plej bonan kondukilon en tiuj ĉiuj aferoj,” diris Majstro.

La diktado estis plenumata, de mateno ĝis vespero aŭ nokto, tiamaniere, ke Majstro nur kuŝis sur la speciala tablo por la diktado, sen eĉ unu konsultilo. La diktado estis farata sen stagno kaj sen rediro. Dum la diktado foje aŭdiĝis ronkado ĉe la spaco inter vortoj. Majstro momente rimarkis kaj demandis, “Ha, mi dormetis. Ĝis kiu loko mi diktis?”, kaj kiam skribanto voĉlegis la lastajn unu aŭ du liniojn, denove komenciĝis la diktado.

En la diktado aperis multaj scenoj kun diverslandaj regionaj nomoj kaj lingvoj. Kiam la sceno temis pri tropika regiono, Majstro ŝvitis, eĉ se la diktado estis farata en vintro; kiam temis pri glacia regiono, li kovris sin per hutonoj (litkovriloj) foje eĉ kun kotaco (japana tradicia varmigilo).

Dum kvin jaroj ĝis julio en 1926 li diktis 72 volumojn (74 librojn), de oktobro en 1933 li diktis 9 volumojn kaj en decembro 1934 li finis la tuton. Ja estas longa historio, konsistanta el entute 81 volumoj (83 libroj) kaj 2047 ĉapitroj. Ĝi inkluzivas aritkolojn, eseojn kaj poemojn, kaj tamen, la tuta strukturo estas romane teksata, la enhavo konsistas el diversaj temoj kaj priskribas la vojon, kiu kondukas al la ideala ĉielula regno surtera “Mondo de Miroku”.

Aldone, pro tiu titolo —“Rakontoj el la Spirita mondo”— multaj homoj emas imagi al si la rakonton pri postmorta mondo, sed ĝi ne estas rakonto kiu temas nur pri postmorta mondo: ĝi temas pri la Granda Universo, inkluzivanta la mondojn materian kaj spiritan. Estas tre malfacile simple difini, kia estas la enhavo de tiu ĉi “Rakontoj el la Spirita Mondo”, sed ĝi estas rigardata kiel fundamenta verko por moralo kaj diservo, por bona

regado de la mondo, kaj plue, kiel libro de Dia antaŭdiro, libro de Dia regado, libro de mondsavo, libro por ricevi la internofluon de Dia karaktero, libro, kiun ĉiuj homoj devas legi, libro por utiligi la vortanimon k.a.



Sobre onisaburo DEGUCHI, o autor

Onisaburo DEGUCHI (1871-1948) nasceu em Kameoka, província de Quioto. em 1898, praticando ascetismo no Monte Takakuma, que se ergue junto à sua terra natal, teve ele consciência de sua missão religiosa. no ano seguinte aderiu à comunidade oomotana (fundada em 1892), em Ayabe. em 1925 fundou a Associação Universal de Amor e Fraternidade, lançando a idéia sobre o Humanitarismo Universal e a origem comum de todas as religiões. em 1934 inaugurou o “Showa-Shinseikai”, dando início ao Movimento Nacional Espiritual (Moral), com a aprovação de 10 milhões de pessoas. em 1935 ocorreu o segundo Caso-Oomoto (opressão ordenada pelo governo), tendo Onisaburo passado 6 anos e 8 meses na prisão por suspeita de infringência da “lei de ordem pública” e de crime de “desrespeito ao Imperador”.

Sobre “Contos do Mundo Espiritual”

Em outubro de 1921, 23 anos após sua ascese no monte Takakuma, O Mestre Onisaburo DEGUCHI recebeu uma ordem de Deus: Mostre claramente as coisas que você viu e ouviu durante a ascese no monte Takakuma”. Então, pela primeira vez ele publicou o conteúdo do que até então guardava no fundo do coração, como “Contos do Mundo Espiritual”.

“Eis aqui o conto, constituído exatamente das circunstâncias por mim presenciadas nos mundos obscuro (esfera abrangente dos reinos Interno e infernal) e divino, quando minha alma viajava no mundo espiritual. No mundo espiritual tudo transcende tempo e espaço, e todas as coisas antigas e presentes do mundo espiritual se refletem por igual aos olhos, indiferentemente se estão distantes ou próximas, se são grandes ou pequenas, luminosas ou escuras. Conseqüentemente, para que os leitores compreendam com a facilidade possível, fiz o ditado procurando o melhor recurso para todos estes assuntos,” disse o Mestre.

O ditado era feito da manhã até a tarde ou a noite, de modo que o Mestre apenas se deitava sobre uma mesa especial para isso, sem nenhuma anotação sequer, para consulta. Ditava sem nenhuma pausa ou repetição. Às vezes, durante o ditado, ouvia-se um ronco no espaço entre as palavras. Num instante o Mestre observava e perguntava: “Ah, cochilei. Onde parei?”, e quando o escrevente lia a última ou as duas últimas linhas, ele começava a ditar novamente.

Durante o ditado surgiam muitas cenas com nomes e línguas regionais de diversos países. Quando o cenário se referia à região tropical, o Mestre suave, mesmo quando o ditado se realizava no inverno; quando se tratava de região glacial, ele se cobria com futons (cobertores), e às vezes até usava *kotatso* (tradicional aquecedor japonês).

Durante cinco anos, até julho de 1926, ele ditou 72 volumes (74 livros); de outubro de 1933 ditou nove volumes, e em dezembro de 1934 completou a obra.



Jooüan (bril-tebovlo) farita de Onisaburo

É, com efeito, uma longa história, constituída, ao todo, de 81 volumes (83 livros) e 2047 capítulos. Essa obra inclui artigos, ensaios e poemas; entretanto, toda a sua estrutura é romanceada. Seu conteúdo apresenta diversos assuntos, descrevendo o caminho que conduz ao reino ideal na Terra: o “Mundo de Miroku”.

Ademais, pelo seu título — “Contos do Mundo Espiritual” — muitas pessoas costumam considerá-lo uma história sobre um mundo póstumo, mas não se trata apenas de um mundo de além-túmulo: trata-se, isso sim, do Grande Universo, que abrange os mundos material e espiritual. É difícil determinar, com palavras simples, qual o conteúdo destes “Contos do Mundo Espiritual”; é, porém, considerada obra fundamental para a moral e para o serviço de Deus, para o bom governo do mundo e, ainda mais, como livro de predição divina, livro do governo de Deus, livro da salvação mundial, livro de recepção da corrente interna do caráter divino, enfim, livro que todas as pessoas devem ler, livro destinado à utilização da alma da palavra, etc.

Rakontoj el la Spirita Mondo

Origino

Ekde la apartiĝo de la ĉielo kaj la tero jam pasis ĉirkaŭ 5670 milionoj da jaroj kaj finfine proksimiĝas la tagiĝo kiam aperos Dio Miroku. Por plenumi la grandan reformadon de la tri mondoj materia, ob-skura kaj Dia, kaj por realigi la Pinan Mondon, Dio Miroku malsupreniros kaj starigos Diajn kolonojn kaj klarigos la kvar verojn *Ku, Ŝuu, Mecu kaj Doo* kaj montros la ĝustajn instruojn *Doo, Hoo, Rej*, kaj *Secu* (etikon kaj moderecon). La Dio klopodos instigi homojn al la bono kaj disciplini malbonulojn, disvastigos la instruon de la plej altaj kompatoj kaj amo, revelacios Dian leĝon, sub kiu la mondo estos bone regata, kaj plivastigos en la universo la bonan regadon laŭ Dia volo. Jen proksimiĝas tia tempo.

Ho, kia favoro ke ni naskiĝis en la transira periodo al tia sankta mondo, senprecedenca en la senlime longa historio de la universo, kaj ke ni povas servi por Dia afero! Dio rivelacias: *“Dio estas Sankta Spirito animanta ĉion kaj la homo estas adminstratanto en la regado de la mondoj spirita kaj materia”*.

Ha, escepte de la nuna tempo, en kiu tempo ni servu por Dia afero de la ĉielo kaj la tero? Ha, des pli por tiuj homoj, kiuj estis naskitaj en la lando, kie vortanimo invitas la feliĉon, lando, kiu prilumas la ĉielon per vortanimo, lando, kie viglas vortanimo, lando, kiun Dio kreis kaj lando, plena je Dia virto! Ni do danku Dion por la alta kaj profunda favoro kaj respondu al la koro de l' Prapatra Dio de la tero.

(el V.1 “Origino”)

Laŭ Dia gvido mi asketis en la monto Takakuma kaj la progreso de mia spiritkapablo estis ekstreme rapida. Al mi ŝajnis ke la studo pri spirito progresis kun la rapideco pli granda ol tiuj de vagonaro, aviadilo kaj fulmo. Aliesprime, tio progresis kiel se iu lernanto de infanlernejo rekte transiris en universitaton kaj finis ĝian tutan studon kaj akiris doktorecon dum palpebruma tempodaŭro. Mi travidis estintecon, estantecon kaj estontecon, kaj eltrovis la ŝlosilon por solvi la misterojn en Dia regno,

jam ne parolante pri tio, ke mi povis antaŭvidi la okazaĵojn de la materia mondo post centoj aŭ eĉ miloj da jaroj. Estas domaĝe, tamen, ke ankoraŭ mi ne povas malkaŝi ilin detale, ĉar ili ĉiuj estas Diaj sekretoj.

(el V.1 Ĉapitro 1 “Asketismo sur la sankta monto”)

Ordinare multaj el sociaj homoj, al mi ŝajnas, pensas, ke la asketismo, celanta al la spirita mondo, temas pri malfacila kaj suferplena praktikado en profundaj monto kaj valo, for de la sekulara vivo. Oni sin enfermas en jaŝiro de monto-dio, praktikas fastadon neniom trinkante varman akvon kaj tute ne uzante fajron por kuiri, kaj faras strangajn asketadojn kaj bizarajn movojn nudpiede kaj nudkorpe, febre pripreĝante dion aŭ budhon. Kaj oni fiere pensas, ke per tio oni jam finis la ĝisfundan asketismon.

Ĉar la asketismo, en sia vera senco, estas agado, ĝia unua celo devas esti granda aktivado en la materia mondo kaj sincera servado al la Dio de l' ĉielo kaj tero ene de Lia regado, sekvante la veron: unueco de la mondoj materia kaj spirita kaj unueco de korpo kaj animo. Se iu homo absorbiĝas en bizara konduto kaj stranga asketado en mallumeta arbaro, forlasante la socian laboron, eĉ se dum unu monato, tio estas nenio alia ol unumonata perdo, kiun suferas socio mem, nome, li estas sabotanto aŭ strikanto de Dia regno. Se temas pri la asketismo en Dia regno, ĝia plej grava afero devas esti klopodo por la entreprenoj, produktiva, kultura, progresema kaj evoluiga.

La asketismo de Dia regno ne estas tiom frivola kaj facila. Kaj tamen, tre povos esti, ke oni kontraŭdemandos min, “Ja estas granda memkontraŭdiro, ke vi mem praktikis asketismon eĉ unusemajnan en la monto Takakuma, dum vi neas la asketismon en monta arbaro”. Sed, antaŭ ol mi faris tion, mi jam plenumis la dolorplenan asketadon en la socio dum 27 jaroj; do mia asketismo en la monto Takakuma povis esti kursfina ceremonio de tiu de socio: estis la unua kaj la lasta ekzercado dum mia tuta vivo.

(el V.1 Ĉapitro 2 “La signifo de asketismo”)

Contos do Mundo Espiritual

Origem

Da separação do céu e da terra já se passaram cerca de 5.670 milhões de anos, e, finalmente, aproxima-se o raiar de um novo dia em que surgirá o Deus Miroku. Para levar a cabo a grande reforma dos três mundos, material, obscuro e divino, e para realizar o Mundo do Pinheiro, o Deus Miroku descerá à terra e erguerá divinas colunas, esclarecendo as quatro verdades: *Ku, Shuu, Metsu e Dôo* e mostrando os ensinamentos exatos: *Dôo, Hoo, Rey e Setsu* (ética e moderação). Deus se empenhará em instigar os homens ao bem e a disciplinar os maus, difundindo o ensinamento sobre a suprema compaixão e o amor, revelando a lei divina, sob a qual o mundo será bem governado, e difundindo no universo um bom governo segundo a vontade de Deus. Eis que se aproxima tal época.

Oh, que mercê ter eu nascido no período de transição a esse mundo sagrado, sem precedente na história infinitamente longa do universo, e podermos servir à causa de Deus! Deus revela:

Deus é um Espírito Sagrado, que anima todas as coisas, e o homem é o administrador, no governo dos mundos espiritual e material.”

Ah, com exceção do tempo presente, em que época devemos servir à causa de Deus no céu e na terra? Ah, tanto mais para aqueles homens, que nasceram no país em que a alma da palavra convida à felicidade, no país que ilumina o céu por meio da alma da palavra, no país em que VIGIA a alma da palavra, no país criado por Deus, e no país referto de virtude divina! Demos, pois, graças a Deus pela alta e profunda mercê, correspondamos ao coração do Deus Ancestral da terra.

(Do Vol.1 “Origem”)

Guiado por Deus, pratiquei ascetismo no monte Takakuma, e o progresso de minha faculdade espiritual foi extremamente rápido. Pareceu-me que o estudo acerca do espírito progrediu com rapidez maior que a do trem, do avião e do raio. Por outras palavras, esse estudo progrediu, como se um estudante de jardim de infância passasse diretamente para uma faculdade e terminasse todo o seu estudo, conquistando o grau de doutor num piscar de olhos. Olhei o passado, o presente e o futuro, e encontrei a chave para solucionar os mistérios do Reino

de Deus, sem falar que pude antever os acontecimentos do mundo material que ocorreriam após centenas e até milhares de anos. Entretanto, é pena que ainda não possa revelá-los minuciosamente, pois todos eles constituem segredos divinos.

(do Vol. 1, Capítulo 1, “Ascetismo no monte sagrado”)

Geralmente, parece-me que muitas pessoas da sociedade pensam que o ascetismo que visa ao mundo espiritual consiste na prática difícil e penosa realizada nas altas montanhas e vales, longe da vida secular. Enclausura-se no santuário de um monte divino, pratica-se jejum, não bebendo água quente alguma, não usando fogo para cozinhar, e fazendo estranhas ascèses e movimentos, descalços e com o corpo nu, orando febrilmente a deus ou ao buda. Pensa-se, pois, orgulhosamente, que com isso já terminou completamente o seu ascetismo.

Como o ascetismo, em seu verdadeiro sentido, constitui ação, seu primeiro objetivo o deve ser uma grande atividade no mundo material e um sincero serviço ao Deus do Céu no interior do Seu reinado, seguindo esta verdade: unidade dos mundos material e espiritual e universalidade do corpo e da alma. Se uma pessoa se entrega a uma conduta bizarra e estranha ascèse na penumbra de uma floresta, abandonando o trabalho social, mesmo durante um mês, isto nada mais é que a perda de um mês sofrida pela própria sociedade, ou seja, ela será um sabotador ou grevista do Reino de Deus. Se se tratar do ascetismo no Reino Divino, sua maior importância deve constituir esforço para as empresas, esforço esse produtivo, cultural, progressivo e evolutivo.

O ascetismo do Reino de Deus não é tão fútil e fácil. Entretanto, pode ser, sem dúvida alguma, que me contestarão: “Com efeito, é assaz contraditório que tenha você mesmo praticado ascetismo durante uma semana, no monte Takakuma, e que entretanto negue o ascetismo na floresta das montanhas”. Antes, porém, de praticá-lo, eu já havia cumprido a dolorosa ascèse na sociedade, durante 27 anos; logo, meu ascetismo no monte Takakuma pôde constituir uma cerimônia de término de curso dessa sociedade: foi o primeiro e o último exercício durante toda a minha vida.

(do Vol. 1, Capítulo 2, “O significado do ascetismo”)

Bonajn modelojn

Pere de la tradiciaj artoj kaj kulturoj

En tiu ĉi jaro (la 29an de aprilo) la Kvina Spirita Gvidantino de Oomoto, Majstrino DEGUĈI Kurenai, ricevis la 5an datrevenon ekde sia enoficiĝo je la gvidantineco. Ekde la enoficiĝo Majstrino senĉese preĝadas por la realiĝo de la mondpaco, kaj dume ŝi multe klopodas kaj por la agrolaboro kaj por la artagado: ŝi penas realigi la principon “religio, t. e. arto, t. e. vivo”, kiu estas modela vivmaniero de la Mondo Miroku (ideala mondo de Dio).

La 31an de marto, ĉijare, Majstrino fondis, ene de la sankta tereno Bajŝoo-en, Ajabe, la vilaĝon tielno-

matan “Curu-jama-Miroku-mura (la Vilaĝo Miroku en Monto Curu-jama), konsistantan el la ekzercejo de ceramikarto kun fajenco forno, ateliero de teksado kaj hortikulturejo, kun la vortoj,”Mi klopodos por la poluro de la animo pere de la sanktaj laboroj, t. e. praktiko de ceramika arto, teksado kaj agrolaboro, kaj volas montri, pere de la mondo de belo, la bonajn modelojn de l’ ĉielula regno, el tiu ĉi vilaĝo Miroku”. Jene ni prezentos la scenojn de ŝiaj ceramikaj-farado kaj teksado antaŭ la inaŭguro de la vilaĝo, kune kun ŝiaj vortoj el intervjuoj.



“Vere grava ja estas tia koro ‘adori teron’. Ne kun tia koro ke ni plugas teron, sed kun la koro ke ni servas al tero per plugado.

En Diaj Revelacioj Dio plurfoje ripetas la vortojn,”Mondo de Miroku ne realiĝos, se oni ne komprenos la favorojn de la ĉielo kaj la tero.”(el intervjuo por la gazeto Oomoto en la japana lingvo – maja numero, 03)

